



ISRAELA ESPERANTISTO

שפה אחת לכלנו

ORGANO DE ESPERANTO LIGO
EN ISRAELO

הקדמה ומורה הלשון שלם

Tel Avivo 61390,
Poŝtkesto 39004

חמ

N-ro 57. Aprilo 1976

ד"ר עספעדאנמא

[por Hebreoj]

נעהק לעברית

חמ

הנין

ווארשא

שיני הרבי"ח לפ"ק

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ПОЯСЪ
СОЦИАЛИЗМА Д-р А ЭСПЕРАНТО. переводено на еврей-
ский языкъ ГАРБИНОМЪ.
ISRAELA
1976.
ПЯТАЯ ТЫСЯЧА.

La titola pago de la
unua Esperanto Libro
en Hebreo Lingvo

Aleksander Manor

Unua Esperanto -Libro en Hebrea Lingvo (1888)

Ano de Esperanto-Ligo en Israelo, s-ro Feñter, trovis en la biblioteko de Bar Ilan universitato en Ramat Gan s.n. libreton.

La 26-an de Julio 1887 d-ro L. Zamenhof publikigis la unuan Esperanto-libron en la rusa lingvo. La 23-an de majo 1888 hebrea manuskripto tradukita de Hanec, ricevis cenzuran permeson kaj la libro tuj aperis. La formato de la libro estas 13.5X9.5 cm kaj enhavas 109 paĝojn. La teksto sur la kovrilo konsistas el du partoj: hebrea kaj rusa kaj sonas: "Safa aĥat lekulanu. Hakdama umore halaŝon ŝalem". Traduko: Unu lingvo por ni ĉiuj. Antaŭparolo kaj tuta lino instruado de d-ro Esperanto por hebreoj, tradukis hebrean Hanec, Varsovio 1888.

La rusa parto: Mejdunarodnij jazik soĉinenje d-ro Esperanto, perevedeno na jevrejski jazik Ganecom, Varŝava, 1888, piataja tisjaĉ. Traduko: Internacia lingvo, verko de d-ro Esperanto, tradukita hebrean de Ganec, Varsovio 1888, la kvina milo.

Kiu estis Hanec, kiu tradukis hebrean la esperantan lernolibron de d-ro Zamenhof? Hanec (trad: nizo) estas pseŭdonimo de hebrea verkisto kaj ĵurnalisto Naftali Herc Jehuda Najmanoviĉ (1843-1898). Li estis konstanta felietonisto de la hebrea ĵurnalo "Hacefira" aperinta en Varsovio. Naĥum Sokolov, la redaktoro de "Hacefira" (La Matenruĝo) kaj antaŭ lia vivfino la prezidanto de la Tutmonda Cionista Organizaĵo, skribis, ke Hanec estis la unua, kiu propagandis Esperanton en la hebrea lingvo. Lia tradukita hebrea lernolibro aperis en Varsovio en 6 eldonoj. La lasta en 1909. Li estis la unua esperantisto-pioniro inter judoj. En la jaro 1888 li ankaŭ tradukis la lernolibron de Zamenhof en la hebrea lingvon (66 p.).

Sur la lasta paĝo de la hebrea libreto de Hanec li notas la adreson de Sokolov kaj sian propran por mendantoj de la lernolibro. Li aldonas ankaŭ: se iu volas skribi al la aŭtoro mem, skribu: d-ro L. Zamenhof por d-ro Esperanto Varsovio. (Li ne aldonas al la adreso la straton.)

La komenco de la antaŭparolo al la unua Libro en hebrea lingvo estas la sama kiel en la rusa lingvo? (trad.) La nun proponatan broŝuron la leganto kredeble prenos en la manojn kun skeptikeco kaj antaŭjuĝo, ke ĝi estas iu neatingebla utopio.

La antaŭparolo ampleksas 40 paĝojn. Li priskribas eĝi, kiel imagis al si d-ro Zamenhof la disvastiĝon kaj venkon de lia ideo kaj de internacia lingvo.

Speciala paĝo en la libreto enhavas promeson de la leganto kiu tekstas: "Mi subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson.

Subskribo: "


Zamenhof petas la legantojn, ke ili resendu al li tiun ĉi promeson kaj donu saman tekston al siaj konatuloj ke ankaŭ ili tiel agu. Li substrekas, ke se la nombro de la respondoj atingos 10 milionojn, ĉiuj nomoj kaj adresoj estos presitaj en speciala libro. Kaj tuj post la apero de tiu ĉi libro, naskiĝos nova popolo nombranta milionoj da adeptoj, kiuj sin devigis publike ellerni Esperanton. Tiamaniere la tuta problemo estos solvita.

La libreto enhavas ankaŭ ses paĝojn de esperanta teksto. Troviĝas tie tradukoj de la Biblio, diversaj versaĵoj, originalaj versaĵoj de Zamenhof kaj letero de aŭtoro al la leganto, en kiu li lin petas respondi ĉu li ĝin komprenis nur per la helpo de la vortaro (La letero ne enhavas neesperantajn vortojn).

En la esperanta teksto de la libreto ĉiuj esperantaj vortoj estas dividitaj per komo en siajn partojn: radikoj, sufiksoj, prefiksoj kaj gramatikaj finaĵoj. (La aŭtoro aldonas, ke tiuj dividadoj ne estas necesaj en la libroj kiuj aperos poste en Internacia Lingvo.

En la esperanta teksto mankas la supersignoj de "ŭ" kaj ili estas anstataŭataj per "u". Estas tamen supersignoj super "ŝ, ĉ, ĝ, ĵ, ŝ". Sur la paĝo 27-a li aldonas rimarkon, kiel "ŭ" devas esti skribata.

Sur la paĝo 5-a d-ro Zamenhof atestas, ke la internacian parton en tiu ĉi libreto li mem trarigardis kaj trovis, ke ĝi estas senerara. La tradukinto aldonas, ke tiun aserton skribis Zamenhof mem esperante kaj li malsupre aldonis la hebrean tradukon.



ESPERANTA UNIKAĴO

Originala esperanto letero de d-ro Zamenhof skribita en la jaro 1888 al la judaj lernantoj de Esperanto.

(Vidu la artikolon de A. Manor).

K a r a a m i k o !

Mi prezentas al mi kian vizaĝon vi faros post la ricevo de mia letero. Vi rigardos la subskribon kaj ekkrios: ĉu li perdis la saĝon?! Je kiu lingvo li skribis? Kion signifas la folieto, kiun li aldonis al sia letero? Trankviliĝu mia kara! Mia saĝo, kiel mi almenaŭ kredas, estas tute en ordo.

Mi legis antaŭ kelkaj tagoj libreton sub la nomo "Lingvo internacia". La aŭtoro kredigas, ke per tiu lingvo oni povas esti komprenata, de la tuta mondo, se eĉ la adresito ne sole ne scias la lingvon, sed eĉ ankaŭ ne aŭdis pri ĝi; oni devas sole aldoni al la letero malgrandan folieton nomatan "vortaro". Dezirante vidi ĉu tio estas vera, mi skribas al vi en tiu lingvo kaj mi eĉ unu vorton ne almetas en alia lingvo, tiel kiel se ni tute ne komprenas unu la lingvon de la alia.

Respondu al mi ĉu vi efektive komprenis kion mi skribis. Se la afero proponita de la aŭtoro estas efektive bona, oni devas per ĉiuj fortoj lin helpi. Kiam mi havos vian respondon, mi sendos al vi la libreton; montru ĝin al ĉiuj loĝantoj de via urbeto, sendu ĝin ĉiun vilaĝon ĉirkaŭ la urbeto, ĉiun urbon kaj urbeton, kie vi nur havas amikojn aŭ konatojn. Estas necese, ke grandega nombro de personoj donu sian voĉontiam post la plej mallonga tempo, estos decidita afero, kiu povas porti grandegan utilon al la homa societo.

J. Kohen Cedek

JIDAJ VERSAĴOJ DE L. L. ZAMENHOF

Verŝajne antaŭ ol L.L. Zamenhof sin dediĉis al perfektigo de sia Internacia Lingvo, kiam li ankoraŭ ageme interesiĝis pri la solvo de judaj problemoj, do inter la jaroj 1881-1884, li prilaboris sian projekton: "Eksperimento pri gramatiko de novjuda lingvo". Per la nocio "novjuda" li nomis la jidan lingvon, ĝis tiam ofte nomata "judgermana ĵargono", por diferencigi ĝin de la "antikva-juda" t.e. de la hebrea lingvo. Lia celo estis prezenti al la juda popolo norme homogenan, laŭregulan lingvon, kiu servu al ĝi kiel "lingvo klara". -laŭ esprimo de profeto Cefania. Ĉar la jida lingvo estis tiam ofte ne regule kaj diversdialekte uzata,

pro manko de komune aprobita gramatiko. La manuskripton de tiu ĉi verketo L. L. Zamenhof tamen ne publikigis, probable ĉar li komprenis la kontraŭdiron de la juda publiko al sia propono enkonduki la latinan literaron en la jidan lingvon, anstataŭ la kutiman, la hebrean. Aŭ malesperiginte pri la eblo, ke la jida lingvo vere fariĝos komune akceptita kiel tutpola NACIA interkomunikilo kaj esprimilo de la juda spirita kulturvivo. Krom tio, la idealo pri internacia lingvo, forpuŝis lian ideon pri la jida kiel nacia lingvo.

Post lia morto, lia filino Lidia, fervora bahaistino, vizitis Palestinon (se mi ne eraras-dum la jaro 1925), por viziti la templojn de bahaistoj en Ako kaj Hajfo. Ĉi okaze ŝi donacis la manuskriptojn de la patra "Eksperimento" al la Nacia kaj Universitata Biblioteko en Jerusalemo.

En la lasta ĉapitro de tiu verketo aperas aldono al la gramatiko, en kiu la aŭtoro instruas la tiamajn neltajn jidlingvajn poetojn pri la versfarado de tonike ritmaj versaĵoj, laŭ la reguloj de ton-metrikio. Klarigante la akcent-strukturon de la kvin ĉefaj "piedoj", la aŭtoro prezentis kvin versmodelojn, jide verkitajn.

Esperantiginte la tutan verketon, mi tradukis ankaŭ la kvin versajn strofojn de L.L.Z. kaj prezentas ilin ĉi tie.

Ĉar multaj legantoj komprenas la jidan, por ke ni povu kompari la tradukojn kun originalo, mi prezentas ĉi tie ambaŭ tekstojn.

Por povi ĝuste legi la originalon tiel, kiel ĝin skribis la aŭtoro, oni priatentu la ortografion, legdonitan de L.L.Z.:

La jidaj literoj *ć, ĥ, ś, ź*, estas respektive la esperantaj: *ĉ, ĥ, ŝ, ĵ*. La *e* estas iam entute ne elparolenda, iam preskaŭ ne elparolata; en versaĵoj apenaŭ aŭdebla *e*; *z* kaj *e* estas ne elparolendaj. La diftongoj *EU* estas elparolenda kiel *ej*; *OU* - kiel *oj*.

Sekvas alterne la strofoj de la originalo kaj de mia traduko.

1. Jambo.

Af jeder loŝen zingt ihr, majne brider,
Vi betlers nehmt ihr alc ba fremde lajt,-
Genug majn folk! vu zanen dajne lider?
Ver euh a menć, ŝteu uf, es iz seun cajt!

En ĉiu lingv` vi kantas fratoj vantaj,
Almozas de fremdlingva font` l` aŭtor`,-
Nun ĉesu mia gent`! per strofoj kantaj
Memstare versu, venis ĝusta hor`!

2. Trokeo.

Dajn gevejn vet Got nit heren,
Blind iz er far daje lajden;
Zejen muzst du, zej mit treren,
Eub du vilst in-frejden ŝnajden.

Ne atentos Di` al ploro,
Blinda al suferoj fidi:
Larmu dum semad-laboro
Por rikolton ĝoje vidi.

3. Daktilo.

Cieun, heub uf di farsvolene eugen,
Ze daje kinder un ze zejer neut:
Svah un farsvarct un in-cvejen gebeugen
Betlen zej ous zejer ŝtikale breut.

Levu Ciono okulojn de ploro,
Vidu gefilojn sub jug` de mizer`;
Febraj kaj kurbaj pro prem` de doloro
Ni almozpetas pri pec` da paner`.

4. Amfibrako.

Es ĉien zaĥ ŝifen, es zingen di lajt,
Es ŝoumen zaĥ frejlah di vellén,-
Dos gejen di jiden fun goles bafrajt
An ejenem keumen cu ŝtelén.

Sin tiras ŝipar` kaj jubilas publik`,
Ne povas ondsaum` ĝojon digi,-
La judoj foriras de fremdjuga klik`
Por propran kamenon starigi...

5. Anapesto.

Ict farges daje cores un gliklaĥerhejt
Hejl daje vunden mit lider un vajn,
Un darcejl daje kinder in naĥes un frejd,
Vi es iz biter a josem cu zajn.

Nun forgesu pri plag`, en feliĉa bonhor`
Sin kuracu per kantoj kaj vin`,
Kaj rakontu al filoj dum sorta favor`
Pri mizer` de la orfa destin`.

A. M.

N. B. HAVKIN- PIONIRO DE LA ESPRANTO-MOVADO EN
ISRAELLANDO (EREC-ISRAEL).

Esperanto - Ligo en Israelo (ELI) eldonis nun -(dank`
al mona subteno de sia honora membro Adolf Holzhaus,
USONO) broŝuron de J. Kohen-Cedek pri N.B. Havkin

pioniro de la esperanta organizaĵo kaj movado en Israelo. Tiu ĉi eldonaĵo estas tre valora kontribuo al la historio de nia movado en Israelo kaj devos esti nepre legaĵo por ĉiu israela esperantisto. Jen kelkaj faktoj:

En j. 1922 starigis en Jerusalemo s-ro M. Amiel, usona misiisto, kurson de Esperanto, de antaŭe per stratafiŝoj avizita. La afiŝo varbis la atenton de N.B. Havkin, kiu finis la kurson kune kun siaj gefiloj. De tiam la persistema Havkin fariĝis nelacigebla propagandisto de ties "Interna Ideo". Kiam M. Amiel revenis Nov Jorkon, la kursgvidadon reprenis Havkin, varbinte kelkajn agemajn adeptojn. Li starigis en Jerusalemo la esperantan societon "Paco kaj Frateco" kaj prezidis ĝin (ek de j. 1924.)

En j. 1925 eldonis Havkin proprakoste broŝuron kaj artikolojn pri Esperanto kun la gramatiko kaj korelativvorta tabelo en hebrea lingvo. Estis ĝi la unua propagandilo en la hebrea lingvo en Palestino aperinta. Samjare organizis Havkin la unuan landkunvenon de palestinaj esperantistoj. Ceestis pli ol 45 kunvenintoj el diversaj urboj de la lando.


La tuton vi povas legi en la broŝuro, 16-paĝa kun verda kovrilo ofsete presita. Prezo: 2.50 IL, aĉetebla ĉe bibliotekisto de ELI S-ano J. Giladi dum la klubejaj vesperoj aŭ per poŝto aldonante unu IL por la poŝtelspezoj. (Adreso: J. Giladi, Kvar Saba, str. Ĉerniĥovski 94.)

LIBANO - EKZEMPLO POR KUNVIVO DE DIVERSRELIGIAJ ARABOJ

Du promesojn ricevis Israelo de PLO (Palestina Libera Organizaĵo) kaj de la demokrata okcidenta mondo. La promeso de PLO estas krei demokratian sekularan palestinan ŝtaton, en kiu Araboj kaj Judoj kunvivos pace, kaj la okcidenta mondo promesas sian garantion por sekureco de tiu ŝtato. Certe ni devas aldoni, ke la promeso de paca kunvivo de Judoj kaj Araboj rilatas nur Judojn, kiuj venis al Israelo antaŭ la jaro 1917, kio signifas 20% de nuntempa loĝantaro. Nun ni tamen povas serioze prijuĝi, kiom valoras tiuj promesoj.

Inter 19 arabaj ŝtatoj estas nur unu, kiu havas modernan demokratian karakteron. Ĝi estas Libano. En tiu lando PLO ricevis liberecon kunvivi kun la loka loĝantaro kaj eĉ organizi siajn militajn fortojn kontraŭ Israelo. Kia estis rezulto de tiu permeso? Interna milito eksplodis tie inter kristanoj kaj islamanoj (paca kunvivo en sekulara ŝtato de du religioj) - PLO estas aktive enmiksita en tiun militon. La milito daŭras jam 11 monatojn kaj kun mallongaj

paŭzoj, ĝis nun estas 12.000 mortigitoj kaj duoble pli da vunditoj kaj neniu povas antaŭvidi la finon de tiu milito. De alia flanko la okcidenta mondo, kiu promesis helpi al Libano, se ĝia demokratio estos danĝerigita, silentas. Kaj tiu longega murdado, detruo de parto de la urboj, ruinigo de la ekonomio, forkaptado de garantiuloj daŭras kaj akriĝas, malgraŭ ambaŭ flankoj estas Araboj, parolantaj saman lingvon, edukataj en la sama kulturo. Nur la religio estas alia... kion do povas atendi israelano de PLO en similaj kondiĉoj? Kiun helpon povas atendi israelano de la kristana okcidenta mondo, se ĝi ne helpas al kristanoj?



H. Masler

NI KONDOLENCAS

O T A G I N Z (1896-1976).

Letero de s-ano Mirjam Ginz

Esperanto-Ligo en Israelo,
Tel Avivo

Kun granda doloro en mia koro mi anoncas al israelaj samideanoj, ke mia edzo s-ro Ota Ginz el Kirjat Jam, dumviva membro kaj delegito de U.E.A., honora membro de Ĉeĥoslovaka Esp. Asocio kaj esp. klubo en Praha forpasis la 29-an de febr. ĉ.j.

Naskiĝinta en Ĉeĥoslovakio en la jaro 1896, li esperantiĝis jam en la jaro 1908, fariĝinte tiel unu el la plej malnovaj veteranoj de Esp. Li de la komenco entuziasme kaj aktive laboris por E., fariĝis ano kaj baldaŭ delegito de UEA, en kiu ankaŭ li restis ĝis la fino de sia vivo. Li estis kunkreinto de ĉeĥosl. esp. movado kaj ĝia elstara funkciulo, tradukis kaj verkis multe en Esp.

En la jaro 1956 venis Israelon - tiam, parte jam lamarezulte de naziista persekutado, tamen ankoraŭ aktive laborante por Esp., ĉefe hejme per la korespondado kaj tradukoj. Lia lasta traduko, libro de Reuven Kritz "Fresa mateno", vekis grandan simpatian por Israelo tra vasta esperantistaro en la tuta mondo.

En profunda doloro
Via fidela membrino
Mirjam Ginz

LETERO DE S-ANO A. HOLZHAUS

Kun doloro en la koro mi eksciis, ke O. Ginz forlasis nin. J. Giladi, per letero de 4-a Marto 1976, informis min, ke O. Ginz, malnova esperantisto, la 29-an Februaro 1976 forlasis nin kaj iris tien, de kie neniu revenas. Ĉiuj devas morti. Alle Menschen müssen sterben. Death spares neither small nor great. En mal de muerte no hay médico que acierte. La morte pareggia tutti. Mirties dar niekas iš gyvųjų neis vengė. Omnibus hominibus moriendum est. Nous sommes tous mortels. Vsem tam bytj: komu ranjše komu po-zje. Wszyscy musimy umrzeć.

KIE?

Kie, laca pilgrimanto,
 Fine ripozados mi?
 Ĉu sub palm` en suda lando,
 Aŭ ĉe Regno sub tili`?
 Ĉu per sablo mi kovrita
 Kuŝos apud acean`,
 En dezert` - per fremda man`?
 Kie ajn! -Min ĉirkaŭprenos
 Ĉie la ĉiel` de Di`,
 Kun funebra lum`sin tenos
 Nokte steloj super mi.

H. Heine. Trad. F. Pillath

Antaŭ kelkaj jaroj mi korespondadis kun li. Li helpis al mi per materialo por miaj libroj. Ni memoros vin. Estu facila la israela tero super vi.

Adolf Holzhaus (USONO)

LA PALESTINANOJ

kaj la propono de la palestinaj terororganizaĵoj.

Oni multe parolas pri la "rajto por propra nacia determino". Jam pli ol 150 jarojn daŭras la diskuto inter la favorantoj de la ekzisto de multpopolaj grandŝtatoj (pro la ekonomiaj kaj sekurecaj avantaĝoj de la vasta ŝtata kadro) kaj tiuj kiuj estas por propra nacia determino de ĉiuj popoloj.

Laŭ la lastaj, la nacia sento ne kalkulas kun ekonomia statistiko ĉar ĝi posedas profundajn psikologiajn radikojn; la aspiro al nacia sendependeco estis ĉiam fonto de inspiro al fenomenoj de kreado kaj herceco.

Vera demokrateco povas enkarniĝi nur en ŝtato nacia, kiel eble plej homogena, en kiu la registaro estas pli proksimeca al la popolo, al ĝia spirito kaj deziroj. La homaj rajtoj ne povas nuliĝi eĉ per decidoj de la plimulto. - - -

Sed okazas, ke efektiviĝo de la rajto por propra determino povas esti ĝi absurda: Ĉu valoras, ekzemple, dispartigi nuntempan Brition en kelkajn ŝtatojn: angla, skota, kimra k.t.p.?

Same estas konsentite, ke nacio posedanta sian propran ŝtaton ne havas rajton por propra nacia determino en la teritorio de alia ŝtato. Ĉu ni povas imagi, ke Germanoj, Svedoj, Italoj k.s. postulos al si rajton por propra nacia ŝtato en la limoj de Usono, dum ili posedas siajn proprajn ŝtatojn? Kaj de ĉi tie-al nia regiono:

La antikva juda popolo atingis - post longa altrudita ĉeso - nacian sendependecon en sia patrolando. La araba nacio akiris propran nacian determinon en 19 ŝtatoj; kaj ankaŭ la Palestinanoj havas, fakte, ŝtaton en Transjordanio, kie ili estas en plimulto. Kio estas do ilia rajto neigi la rajton por determino de la juda popolo en Israelo?

Ni forĵetas do senhezite la sloganon de la "Palestina Liberiga Organizo" pri "demokrata sekulara ŝtato" kiu fondiĝos anstataŭ Israelo.

Israelo estas la sola demokratio en la Mezoriento; kaj kion proponas la ĉefoj de la palestinaj terororganizaĵoj estas - aldoni al la 19 ŝtatoj de la araba nacio (de kiu la Palestinanoj estas parto) du palestinajn ŝtatojn ĉe la du bordoj de la rivero Jordano - kaj forigi de la juda popolo ĝian rajton por nacia determino, dire senigi la esperon de nia popolo al nacia vivo, kaj cetere al entuta ekzisto. Neniam ni akceptis tiel afablan proponon de totala memortigo kaj la lastaj okazintaĵoj en Libano nur konfirmas justecon de nia sinteno.

Kiel povas la reprezentantoj de P.L.O proponi la ni kunekzistadon en kadro de "demokrata ŝtato" dum ili ne scipovas loĝi kune kun siaj gefratoj en Transjordanio, kies linvo, religio kaj historio estas komunaj?

J. GF.

Josef Šemer

C F A T (Safad) - Galilea urbo kun
 riĉa historio.

Cfat estas la plej alte situata urbo en nia lando (900 m. super la marnivelo). Ĝi troviĝas en la nordo de Israelo, en la Supra Galileo.

Cfat akiris sian famon pro sia belega montara pejzaĝo, kiu altiras multajn vizitantojn kaj artistojn. La freŝaero de Cfat, frideta kaj saniga, transformis ĝin en faman pro ĝiaj ripozejoj urbon. La beleco de la antikva kastelo superreganta la urbon, de malnovaj stratetoj, de sinagogoj kaŭzis, ke ĝi fariĝis famkonata turista centro.

Cfat posedas riĉan historion. Dum la krucmilitista epoko ĝi iĝis ĉefurbo de la Supra Galileo kaj tie estis konstruata granda fortikaĵo.

Dum centoj da jaroj kaj ĉefe en la 16-a kaj 17-a jarcentoj, servis la urbo kiel grava komerca centro - pro ĝia topografia lokiĝo, kuŝanta ĉe la ĉefvojo kiu kondukas de Ako al la Galileo.

En tiu tempo alvenis al Cfat multaj judaj enmigrintoj, kiuj fondis tie tre riĉan spiritan vivon. Multaj cfataj saĝuloj transformis la urbon en sanktan centron de la juda religia sekretinstruo - la mistera teorio nomata "Kabala" - kabalo.

Dum la 18-a kaj 19-a jarcentoj okazis en Cfat kelkaj tertremoj kaj epidemioj. En la mezo de la 19-a j.c. ĝi estis totale detruita, rezulte de severa terskuo, sed post tiu katastrofo oni rekonstruis la urbon.

Antaŭ la fondiĝo de la Israela Ŝtato estis la situacio de la loka juda loĝantaro tre mizera. Sed post la fino de la milito por Sendependeco Cfat absorbis multajn novenmigrintojn.

Nuntempe staras flanke de la antikva urbo novaj kvartaloj, kiuj kun la fama artista kvartalo formas la belan ĉemontan urbon Cfat.

N. Alterman
melodio - Naomi Ŝemer

Trad. Amri Vandel

S U R V O J A A R B O

En vojkruciĝ`staradis arb`
Falante teren staris
Dormu fil` noktiĝis jam
Tempesto jam surmaris.

Silentu fil`kliniĝas ŝip`
Pro l` storma furiozo
Survoje staras arb` antikv`
Staradas sen ripozo.

Iame, fil`, al tiu arb`
Via avo proksimiĝis
Foriĝis jam la suna ard`
La branĉo ne moviĝis.

Preĝis tie avo vi`
Vizaĝ`Jerusalemon
Plorante preĝis li al Di`
Preĝadis ĝis mateno.

Al tiu arb` la patro vi`
Estis ŝnur`ligita
Fer`kaj vip` lin batis fil`
Li estis mortskurĝita

Kaj kiam la glav`-akra vip`
De lia sango ruĝis
Silente teron falis li
Nur maraj ondoj muĝis.

Falis li de sia altar`
Vizaĝ` Jerusalemon
Silentu, fil`, ĉar en la mar`
Kliniĝas ŝip` abismon.

Aŭskultu, fil` al muĝa mar`
Ĉar la mast`bastono
Estas ankaŭ la altar`
Kaj la preĝkolono.

Ŝipeto sur la ond` kliniĝ`
Jam venkis la tempeston,
La arbo de la vojkruciĝ`
Estis tranĉita, fariĝis masto.

Survoje arbo de l` arbar`
Firme jam staradas
Silentu, fil`, en vasta mar`
La ŝipo veturadas.

Ajala Uko

A M U Z A O K A Z I N T A J O

Tio okazis antaŭ dek jaroj. Mi vivis kaj instruis en Londono en angla lernejo. Mi amikiĝis kun instruistino May. Ŝi estis ŝvelronda, rozkolora kaj bluokula, -kiel la vera, angla rozo. Ŝi ŝatis manĝi kaj ĉiam maĉis aŭ suĉis ion. Ŝi faris tion sekrete, ĉar mi ĉiam riproĉis ŝin pro ŝia manĝemo kaj manko de sinregado.

Mi ŝatis ŝin, ĉar ŝi estis afabla kaj bonhumora kaj parolis belan anglan lingvon. Mi multe lernis de ŝia perfekta lingvo.

Ni decidis somere fari ekskurson al la kontinento. En nia plano estis Venecio, Jugoslavio kaj Tirolo. En vojaĝoficejo ni pagis nur por la vojaĝo kaj ne mendis hotelon. Unu de nia lerneja personalo diris al mi: "Kiel vi volas trovi loĝejon aŭgustmeze en Venecio? Vi certe devos dormi sur gondolo!" (Efektive ni trovis tre bonan ĉambron en Venecio, sed sendis al Londono bildkarton de gondolo kaj surskribis: sur ĝi ni dormis en Venecio.)

Ni alvenis noktmeze al Venecio. La stevardino prenis niajn valizojn kaj metis ilin en unu de du aŭtobusoj, kiuj nin atendis; por ni ŝi donis lokon en alia. Ni ne ricevis de ŝi iun klarigon, ĉar ŝi ne konis alian lingvon krom la italan.

Dumvoje multaj turistoj forlasis la aŭtobuson por eniri al siaj hoteloj. Ni restis ĝis la fino, kiel la lastaj pasaĝeroj. La ŝoforo klarigis al ni ke certe niaj valizoj restis ĉe la flughaveno.

Ni staris sur la granda placo en Lido en malluma nokto sen valizoj kaj sen ĉambro. La fakto ke ni devas reveni al flughaveno por trovi lasitajn valizojn solvis almenaŭ la problemon de la ĉambro.

Ĉirkaŭe regis kompleta mallumo kaj silento. En la malproksima angulo ni vidis taksion. La taksiisto estis alta, maljuna viro kun grizaj haroj kaj simpatia vizaĝo tre simila al Vittorio de Sicca.

Duonon da horo ni klopodis klarigi al li nian embarason kaj petis veturigi nin al la flughaveno. Ni sidis en la takso. Ni parolis angle, france, germane, iomete ruse - ĉio estis vane. Ni parolis kiel al muro. La taksiisto nenion komprenis aŭ volis kompreni. Li certe pensis, ke ni estas frenezaj kaj decidis forigi nin. Li subite ekmemoris, ke estas en la proksima kafejo kelnero, kiu parolas angle. Bonŝance la kelnero atendis aŭtobuson kun usonaj turistoj. Kun sama aŭtobuso ni revenis al la flughaveno. En la aŭtobuso ni estis feliĉaj. Dumvoje tamen May rimarkis, ke ŝi lasis en la takso mansaketon kun sia tuta mono (okdek sterlingaj pundoj), pasporto, dokumentoj kaj vojaĝĉekoj, ĉion kion ŝi havis por la ferioj.

Kion fari?! Ŝi malesperiĝis. Ŝi ne havis eĉ monerojn. Ŝi devos peti la anglan konsulon, ke li sendu ŝin hejmen. Mi penis konsoli ŝin. Mi diris, ke ni devas iri al la flughaveno por ricevi niajn valizojn. Mi memoris, ke la kelnero en la kafejo nomiĝis Aristides kaj li konis la taksistojn. Matene ni veturos aŭtobuse al Lido kaj ekserĉos la kelneron kaj la taksistojn. Mi penis trankviligi mian amikojn, sed vane, ŝi ploris kaj ploris. Mi aĉetis eble dek tasojn da kafeo al May, ŝi trinkis kaj ploris, ploris kaj trinkis.

Tiel ni pasigis nian unuan nokton en Venecio, atendante la taglumon. Estis belega aŭroro, kiam ni eniris la unuan aŭtobuson. Ni revenis al la granda placo kiun ni ne rekonis en plenlumo. Ĝi aspektis kiel granda brua fondejo. La bazaroj estis plenaj da varoj, legomoj kaj fruktoj, amaso da homoj promenis ĉirkaŭe. Ni trovis la kafejon plenstopitan de trinkantaj kaj manĝantaj homoj. La kelnero Aristides kundukis nin al la angulo de la placo, kie ni ekvidis nian taksistojn. Li staris tie kaj eklevigis la sakon de May. Ni ne havis vortojn por esprimi nian ĝojon. Ni volis ĉirkaŭbraki kaj kisi la bonan viron. May donis al li mondonacon.

Oni rakontas en Anglio, ke ni estu singardemaj en Italio, ĉar Italioj estas grandaj ŝtelistoj. Tiu rakonto pravas, ke oni ne devas generaligi kaj Italioj estas honestaj homoj. Tion pruvis nia mirinda "Vittorio de Sicca". Rimarko de la redakcio: Ĝi pravas ankaŭ, ke la angla lingvo ne estas internacia lingvo, kiel multaj instruistoj de la angla lingvo asertas.

NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

RESPONDE AL S-INO DVORA ŜOR
(koncerne ŝian artikolon en "Israela Esperantisto" n-ro 56 jan.76, sub titolo "Internacia Jaro de la Virino".)

La virina libereco estas tre vasta kaj komplika temo. Pro tio mi ne povas pritrakti ĉiujn punktojn, tuŝitajn en tiu artikolo. Mi volas tamen provi klarigi kelkajn aferojn. Kiel membrino de Liberiga Virina Movado en Israelo mi ne povas konsenti kun ŝia vidpunkto.

"La Internacia Virina Jaro" estis unu granda ŝerco. Dum tiu "Jaro" la virino ne liberiĝis kaj atingis nenion! Ŝi estis kaj restis ĉiam en la pli malsupera stato, ĉar nia socio konsideras, ke la virinoj "estu tiaj, kiaj ili estas."

La fama verkistino Simone de Beauvoir asertis jene: "La virina pasiveco, estanta karakterlinio de virino, evoluas dum la unuaj jaroj de la vivo. Estas eraro opinii, ke tio estas biologia fakto. La sorto, destinita por ŝi estas planita fare de ŝiaj instruistoj kaj de la socio."

Se iu virino ŝatas esti dommastrino kaj flegadi siajn infanojn - bone! Sed kial do, se mi demandas, tiam ĉi virino ĉu ŝi laboras - la respondo estas: "Ne". Ĉu ŝiaj sendube multaj hejmlaboroj ne signifas laboro? Kaj se ŝi posedas iun karieron - kial ĝi okupas la duan, foje eĉ flankan, lokon post ŝia "edzina laboro"? Se virino havas bonan profesion ĉu ŝi ne kapablas vivtenadi la tutan familion? Kial do ne? Eble, ĉar ŝi neniam ricevas la saman salajron kiel la viro...? Sed kial? Eble, ĉar ŝi neniam havas tempon progresi en sia profesio? Jen senlima (sorĉa) rondo, ĉu ne?

La socio nepre konsentu kun virino, kiu ne deziras edziniĝi aŭ naski infanojn kaj, se ŝi estas pli talenta ol ŝia edzo, - ke ŝi iru labori. La geedzoj dividu la hejmlaboron inter ŝi. Se la edzo ne volas esti dommastro - oni klarigu al li, ke la domlaboro ne estas honto.

Mirjam Bukofcer

ANGULO DE J E L I

J E L I D I R O J , K A J J E L I R I D O J

Kiom malfacila estas la destino de la homo - ĝis kiam maturiĝas la animo, ekmalfloras la korpo.

Ne ĉio kio estas verda estas stelo.

La homa besto estas la sola animalo, kiu manĝas ankaŭ kiam ĝi estas sata.

Mi ne timas tiujn, kiuj kontraŭas min, sed zorgigas min tiuj, kiuj ne konsentas kun mi kaj ne havas kuraĝon diri tion.

Tri agojn neniam faru: kalkuli la stelojn, konkerti la maron kaj diskuti kun virino.

Por ripozi trankvile dum maljuneco, la homo laciĝas dum la tuta vivo.

La ebleco esti sola - ne estas io ajn pli bela ol tio. La devo esti sola - ne estas io ajn pli terura ol tio.

Poeto: Ĉu ne estas iu signo en la fakto, ke mi naskiĝis en la tago kiam mortis Haim Naĥman Bjalik?
- - - :Jes, jam diris prasaĝuloj, ke ĉiuj katastrofoj alvenas duope!

Paciento: sinjoro kuracisto, mi suferas pro malsano de forgesemo.

Kuracisto: Kiom da tempo vi suferas pro tio?

Paciento: Pro kio?

14.

La luksaj geedziĝfestoj kostas tiom multe, ke dum la ceremonio la patro ploras, sed ne la patrino...

Gastiganto: Kion vi opinias pri tiu violonisto?

Gasto: Li memorigas al mi Petrikoviĉ...

Gastiganto: Mi miras, Petrikoviĉ entute ne estas violonisto.

Gasto: Ankaŭ tiu ĉi ne estas violonisto.

Filo: Paĉjo, helpu al mi trovi radikojn de ĉi tiuj nombroj.

Patro: Strange, ĉu ekde la tagoj de mia lernejo oni ankoraŭ ne trovis ilin?

Sekretariino: Mi ne povas legi la leteron, mi ne komprenas la manskribon.

Direktoro: Kion vi diras?! La manuskripto estas tre klara kaj ĉiu stultulo povas kompreni ĝin. Donu ĝin al mi kaj mi pruvos tion al vi.

En la historio de la homaro evidentiĝis, ke nur du metaloj estas konservindaj - la oro kaj la israela telefonĵetono.

Kiam Jeĥezkiel kaj Moŝe alvenis al la Koloseo en Romo diris Moŝe: -Jen kion mi diris multfoje, kiam vi ne havas kapitalon por fini projekton, ne komencu ĝin.

Kelnero: Kion vi petas?

Gasto: Bifstekon kaj sinceran vorton.

Post kelkaj minutoj:

Kelnero: Jen la bifsteko.

Gasto: momenton, kaj la sincera vorto?

Kelnero: Ne manĝu ĝin, ĝi ne estas freŝa.

Ŝi: Dio kreis nin belajn kaj stultajn.

Li: Kial?

Ŝi: Belajn, por ke la viroj amu nin, kaj stultajn, por ke ni amu la virojn.

Juĝisto: Sinjorino, kiom jara vi estas?

Sinjorino: 31-jara.

Juĝisto: Nun, kiam vi jam diris vian aĝon, metu vian manon sur la biblio kaj ĵuru diri la veron, la tutan veron, nenion krom vero.

Patrino: Kaj kia estis la ekzameno?

Filo: Tre facila. Mi nur miras, ke la profesoro estis tre religia.

Patrino: Kiel vi scias?

Filo: Post ĉiu respondo mia li kriis: "Sankta Dio!"

Kolektis: Moŝe Ben Porat

15.

EL NIA MOVADO KAJ AGADO

SOMERO 1976

Ateno
1976



La pretigo de la postkongresa ekskurso kaj la antaŭkongresa labortendaro daŭras. Aperis pagitaj anoncoj en "Esperanto" kaj en "Heroldo"; krom tio-nepagitaj informoj en "Heroldo". Estis eldonita informilo pri la ekskurso kaj pri labortendaro. Ambaŭ estas riceveblaj ĉe d-ro Maŝler, T-A, Hapardes 11 kaj ĉe S-ano A. Wandel, T-A, Haka-lir 15.

KARAVANO AL LA KONGRESOJ

JELI organizas karavanon post la tendaro al la kongresoj en Ateno kaj en Tessaloniko. JELI sukcesis malaltigi la vojaĝelspezojn per la grupa flugo kaj poste por la komuna autobusa vojaĝo al Tessaloniko. Informoj ĉe A. Wandel.

KURSOJ

La kurso, kiu komenciĝis en oktobro, finiĝis per ekzameno la 16-an de februaro. Samtempe komenciĝis nova kurso en la sama ejo. La kursojn gvidis d-ro Maŝler. La enspezoj de la kurso kovris la elspezojn por informado kaj propagando kaj aldone donis profiton.

La koresponda kurso daŭras, ĉiam enskribiĝas novaj lernantoj kaj parto de ili finas ĝin. La kurson gvidas senlace s-ano J. Semer. Ankaŭ la koresponda kurso donas senĉese profiton, ĉar s-ano J.S. gvidas la kurson senpage kaj la pagon de kursanoj donas al ELI.

La lecionoj de la koresponda kurso de A. Zajdman estis tre koncizaj. Por faciligi al la lernantoj la lernadon s-ano A. Wandel eldonis aldonon kun multaj klarigoj por la unuaj ses lecionoj.

Novaj s-anoj: d-rino Raĥel Ŝpan, Mordeĥaj Braĥa, Mordeĥaj Levi, Vered Kimĥi, Ofra Solovejĉik.

INFORMADO

La informa turisma broŝuro "Ekkonu Israelon 1971" estas elĉerpita. D-ro Maŝler pretigis novan aktualigitan broŝuron por presado. ELI estas en kontakto kun Ministerio por Turismo, kiu promesis eldoni ĝin per siaj rimedoj.

En la plej nova eldono de la Brita Enciklopedio troviĝas bona kaj ampleksa informo pri Esperanto. S-ano Alberg tradukis ĝin hebrean kaj pretigis ĝin por presado kiel informilon.

D-ro Mašler prelegis en gimnazio "H" pri la internacia lingvo. Aŭskultis 100 gelnantoj.

S-anoj, kiuj turnis sin al la Filatela Servo pri la zamenhofa kaj esperato-poŝtmarkoj, ricevis negativan respondon.

Israela Ministerio de Turismo en sia bulteno por turistoj en angla lingvo "Information Letter" n-ro 134 de Decembro 1975 presigis artikolon pri Esperanto en Israelo. En ĝi ni trovas krom informoj ĝeneralaj pri esperanto, adresojn de ĉiuj reprezentantoj de ELI kaj JELI en ĉiuj urboj en Israelo kaj en kelkaj kibucoj.

La bulteno troviĝas en ĉiuj israelaj turismaj oficejoj en ĉefurboj en Okcidenta Eŭropo, USONO, Kanado, Argentino kaj Aŭstralio. Samideanoj, kiuj intencas viziti Israelon, povas ĝin ricevi ĉe ili senpage.

Jen kelkaj adresoj: Israel Government Tourist Office: Anglio: 59 St. James's Str. London SW.1. A-ILL.

USA: Nov-Jorko, 488 Madison Ave, NY 10022.

Chicago, 5 South Wabash Ave, -Illinois 60603

Atalanta Georgia 30308, 795 Peachtree str. N.E.

Los Angeles, Calif. 90048, 6380 Wilshire Boulevard

Kanado: Toronto 181, Ontario, 102 Bloor Street West.

Suda Afriko: Johannesburg, 915 Rand Central, 165 Jeppe str.

Aŭstralio: Sydney-N.S.W.2000, Carlton Centre, 55 Elizabeth St.

Office National Israelien de Tourisme:

Francio: Paris 2^eme, 14 rue de la Paix.

Belgio: 1000 Bruxelles, 9 rue des Paroissiens.

Svedio: Israeliska Statens Turistbyrå, 10385 Stockholm, Box 7289.

Danio: Vesterbrogade 6 C, 1620 Kopenhago 5, Den Israelske Turistbureau.

Nederlando: Amsterdam, Israelisch Nationaal Verkeersbureau, Wijde Kapelsteeg 2.

Okc. Germanio: Staatliches Israelisches Verkehrsbureau Bethmannstr. 50-54, 6-Frankfurt/Main.

Svislando: Lintheschergasse 12, CH-8001, Zuriko.

Italio: Ufficio Nazionale Israeliano del Turismo, Via Vittorio Veneto 96, Romo.

Argentino: Oficina Nacional Israeli de Turismo, Cerrito 1070 -Piso 5-87, Buenos Aires.

Krom tio oni povas ricevi ĝin en ĉiu israela ambasadejo kaj konsulejo.

VOLAS KORESPONDI

Komencantoj: Friedrich Merla, 14 j., Ostallee 41
4790 Paderborn-Elsen. Okc. Germanio.

Christian Hennig, 14 j., Ostallee 51, 4790 Paderborn-Elsen. Okc. Germanio.

Ignaco Doboš, B-dul 1 Mai N-ro 18, 4150 Odorheiu Secuiesc, jud, Harghita. Rumanio.

57-jara Svedo, S-ro Jan Vedavik, poste restante
40101 Göteborg I., Svedlando, pri literaturo kaj ŝako.

DIVERSAĴOJ

FOTOGRAFAĴO DE JELIANOJ

En "Heroldo" aperis fotografaĵo de la JELianoj ĉe la memortabulo de David Izan en Hajfo.

TESTAMENTO POR ELI

S-ano Svarĵenski de Herclia testamentis al ELI la tutan sumon, kiun li havas en la banko. ELI deziras al s-ano Svarĵenski longajn jarojn de vivo kaj sano kaj tre dankas pro lia legacio.

DONACOJ (pli grandaj ol 10 IL)

D-ro A. Vedrine (aldone al 100 IL antaŭe)	98 IL
D-ro Beňar (por plibeligi la kovrilpaĝon de IE)	200 IL
S-ano A. Holzhaus (por eldoni biogr. de Havkin)	165 usonaj dolaroj
S-ano Kupermann (aldone al kotizo)	1236.20 IL
S-ano Svarĵenski (aldone al kotizo)	20 IL
	20 IL

NE MALFRUIĜU !

Ĉu vi partoprenas kongreson (UK au IJK) en Grekio ĉi somere?

Ĉu vi partoprenus, sed ne povas pro la alta vojaĝkotozito? Se jes, vi povos veturi tien kaj reen per karavano de JELI por nur 2350 (inkl. impostojn, ankaŭ por ELI-anoj). Por detaloj kaj aliĝilo kontaktu Amri Wandel: Esperanto, p.k. 22041 Tel Aviv; Telefono: 03-235593 vespere; Persone: dum la landa konferenco.

K O T I Z O

La kotizo por la jaro 1976 estas 30 IL. Bonvolu pagi ĝin per aldonita ĉeko. Eblas pagi per partpagoj. Vi povas ankaŭ pagi rekte al la kasisto, aŭ al s-anino Haroun dum la landa Konferenco kaj dum la klubaj vesperoj.

N I A J P E R A N T O J

S-ano J. Ben Alter, Petaŝ Tikva, p.k. 379, aŭ str. Bilu 23/4. Tel: 907115, akceptas mendojn por: Sennaciulo, Sennacieca Revuo, Heroldo, Oomoto, Internacia Muzeo, Horizonte. La preson vi povas ricevi rekte de la peranto telefone pro la oftaj ŝanĝoj de la valutprezoj.

Peranto por UEA estas s-ano Adrian (Avi) Kuppermann, p.k. 26014, Tel-Avivo.

PRELEGOJ EN LA KLUBEJO

A. Manor	Optimismo kaj pesimismo en la homa vivo
E. Haroun	Lumbildoj kaj rakonto pri ekskurso al Eĵlat
J. Ben Alter	La juda kanto dum generacioj. (I-a parto)
M. Bukovcser	La psikologio de prizorgbezonaĵoj infanoj
R. Alberg	Humuro de la nacioj
A. Ron	Centroj de juda kulturo en la historio
A. Kuperman	Lumbildoj de Danlando
H. Roth	Rakonto pri ŝia rondvojaĝo en Eŭropo
H. Feŝter	Pri hilelismo kaj "pro domo sua".
K. Perlman	La plej gravaj eventoj de la jaro 1975
S. Ginsburg	La specifaj lingvaj ecoj kaj elparoldifektoj
A. Uko	Dek ordonoj por gepatroj (infanedukado)
J. Ben Alter	La juda kanto dum generacioj (II-a parto)

LA VENONTAJ PRELEGOJ EN LA TEL-AVIVA KLUBEJO

- 1.4. Diskuto pri niaj klubvesperoj (gvidas E. Haroun).
- 8.4. K. Perlman - La plej gravaj eventoj de la jaro 1975 - dua parto.
- 15.4. Fermata (Paskofesto).
- 22.4. A. Manor-Trarigardo de la esp. gazetaro.
- 29.4. H. Maŝler - Necenzuritaj humuraĵoj (dua parto).
- 6.5. J. Giladi - Miaj gekorespondantoj (dua parto).
- 13.5. J. Feŝter - Samaismo "Pro domo sua".

EKSTERLANDAJ GASTOJ

S-ro Allein Eklund, Svedio
 S-ino Ragnhild Lönblad, Danlando (Delegitino)
 S-ino Ellen Mortensen, Danlando
 F-ino Kyllikki Parviala, Finnlando

En februaro vizitis Israelon du estraranoj de Germana Esperato-Junularo (GEJ), s-anoj U. Brandenburg kaj H.D. Platz. Ili venis kun delegacio de germanaj junularaj organizaĵoj. Junulara Esp. Ligo en Isr. (JELI.) aranĝis kelkajn kunvenojn de la loka esp. junularo kun la gastoj.

LA LANDA KONFERENCO de ELI kaj JELI

okazos dimanĉe la 18-an de aprilo 1976-a, dum la paska ferio. Ĝi havos lokon en Tel Avivo, en la impona salono de "Bejt - Lejvik", str. Dov Hoz 30. (Angulo-Gordon str.). La ejo malfermiĝos je la 4-a horo posttagmeze por interamika renkontiĝo.

L a p r o g r a m o

- a. Oficiala parto:
 1. Raportoj pri la landa agado
 2. Raportoj pri la monda E. movado
 3. Diskutado kaj proponoj
 4. Elektoj
- b. Arta parto.

Ĉiuj gesamideanoj el la tuta lando kaj gastoj estas invitataj.

La estraro de ELI kaj JELI




האספרנטיסט הישראלי - כטאון הליגה לאספרנטו בישראל
תל-אביב ת.ד. 59004
חוברת 57-אפריל 1976, העורך: אלכסנדר מנור



ENHAVO

Unua Esperanto-Lernolibro en hebrea lingvo	A. Manor	1.
Jidaj versaĵoj de Zamenhof	J. Kohen Cedek	3.
N. B. Ĥavkin -pioniro de la esperanto-movado en Israellando	A.M.	5.
Libano - Ekzemplo por kunvivo de diversreligiaj Araboj	H. Mašler	6.
Ota Ginz	M. Ginz	7.
La Palestinanoj	A. Holzhaus	8.
<u>TURISMA ANGULO</u>	J. GF.	8.
Cfat	J. Šemer	9.
<u>DE LA HEBREA LITERATURO</u>		
Survoja Arbo (trad. A. Wandel)	N. Alterman	10.
Amuza okazintaĵo	A. Uko	11.
Niaj legantoj skribas	M. Bukofcer	12.
<u>ANGULO DE JELI</u>		
Jelidiroj kaj Jeliridoj	M. Ben Porat	13.
El nia movado kaj agado		15.
Volas korespondi		17.
Diversaĵoj		17.
Prelegoj en la klubejo		18.
Eksterlandaj gastoj		19.
La Landa Konferenco		19.



Redakta komisiono:

Reuven Alberg
Josef Šemer
Dvorka Wunderbaum
Dvora Šor
Aleksander Manor

Redaktoro:

La grafikan parton de
la titolpaĝo pretigis
nova adeptino de nia
lingvo s-ino Rut Ansel.